

Numero:220 .
Septembro 2010.

18-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Adiaŭ somero!

Vekiĝante hodiaŭ matene malĝoje mi rimarkis, nian ĝardenon kovras griza, peza nebulo, kaj sur la strato la homoj iras triste kaj zorgoplene. En ĉies koro nestis profunda ĉagreno pro la forpaso de la belaj, sunriĉaj tagoj.

Por ni, geesperantistoj estas tre gravaj la someraj monatoj, ĉar tiam okazis niaj plej grandaj Esperanto-kongresoj, aranĝoj, kiujn partoprenis multaj geesperantistoj. Pri ili certe vi jam povis legi en diversaj gazetoj kaj revuoj.

Nun ni devas adiaŭi de la somero kaj gaje saluti la aŭtunon, ĉar ĝi donos al ni multe da dolĉaj fruktoj kaj prisorĉos nin per siaj buntaj koloroj.

Ho, kiom bonege ekskursi en la aŭtuna naturo kaj admiri la lastajn florojn de ĉi sezono.

Ofte dum tiaj promenoj mi sentas, ke mi estas en fabellando kaj baldaŭ ekaperos antaŭ mi feino.

-Amiko, estu salutate en nia sonĝomondo kaj ĝuu la vivon!

Por mi la aŭtuno ne estas la forpaso, ĉar ankaŭ en tiuj ĉi monatoj komenciĝas nova lernojaro, kiam malgrandaj hometoj ekiras al la domo de la scio kaj post jaroj ili elpaŝis el ĝi, kiel saĝuloj.

Kiom bonege estus, se kun la gepatra lingvo ankaŭ Esperanto estus instruita, kaj ĝi fariĝus nia vera komunikilo. Mi estas konvinkiĝinta, Esperanto povus plenumi la rolon de komuna lingvo. Oni nur devus voli, ke ĝi disvastiĝu sur la terглоbo.

Espereble iu falanta arbofolio portos nian mesaĝon al iu grandpotenculo, kiu per sia subskribo sanktigos nian deziron, kaj morgaŭ ĉie Esperanto estos parolata.

-Redaktanto-



Kial mi lernu lingvojn?

-Min ne interesas la lingvolernado. Kial lerni fremdajn lingvojn, kiam mi neniam vojaĝos eksterlanden. Mi ne estas la malamiko de mia monujo. Prefere mi manĝos kaj drinkos tiun sumon. Vivi senzorge estas mia unusola sonĝo. Mia najbaro vizitas iun lingvokurson dirante, ke moderna homo ne povas ekzisti sen lingvoscio. Kompatindulo! Mi tute bone povas vivi ankaŭ tiel. Kial mi lacigu min per la lernado de nekonataj vortoj. Se iu eksterlandano deziras paroli kun mi, tiu ellernu mian lingvon. Krome mi ne tro ŝatas la fremdulojn. Ili restu hejme kaj ankaŭ mi ne iras al ili. Ĉiu restu en sia patrujo! Ankaŭ tie ĉi vivas sufiĉe da homoj kun kiuj mi povas babiladi, se mi deziras.

Lasu min per tiu lingvolernado! Ĉu vi ne komprenas, ke mi ne volas lerni fremdan lingvon? Kial vi estas tiom perforta? Foriru! Serĉu alian bubon, kiun vi povos konvinki.

Ho, Dio mia, kial vi ne komprenas, mi ne volas lerni lingvojn?

Aŭskultu min, en mia najbaro vivas viro. Onidire li scias almenaŭ dekdu lingvojn. Li lernis ilin dum sia tuta vivo, eĉ eble ankoraŭ nun li lernas. Kial? Eble ankaŭ li ne scias. Vi diras, ke ĝi estas bela hobia. Ĉu vi scias kiom multekostas lernolibroj, vortaroj kaj aliaj lerniloj? Por mia fileto mi devis aĉeti vortaron, ĉar ĝin li bezonas en la lernejo. Mi preskaŭ svenis ekvidante la fakturon. Sed kion fari, la onklino instruistino mesaĝis, se li ne havos vortaron, tiam mia fileto ricevos malbonan klasifikon. Terure! En la lernejo oni pensas, ke mi faras la bankbiletojn. Kiam mia fileto finos la lernadon, mi tuj ĵetos ĝin en la fornon, almenaŭ ni povos varmiĝi ĉe ĝia flamo. Al mi ne plaĉas, ke en la lernejo oni instruas fremdajn lingvojn. La lingvolernado estas nur forĵeto de mono

Kial mi parolu kun eksterlandanoj? Ili serĉu interpretiston, se ili deziras ion.

Vane vi klopodas konvinki min, mi ne lernos lingvojn. Ĉu vi estas lingvoinstruisto? Jes tiam mi jam komprenas vi volas, ke mi pagu al vi monon por la instruado.

Mi proponas al vi, iru kaj serĉu alian laboron!

Ne! Kaj ne! Mi ne deziras lerni fremdan lingvon. Mi jam diris al vi, lasu min vivi. Nun mi volas iri al drinkejo. La brando estas la vera lingvoinstruisto. Ĝi instruos al mi ĉiom da lingvoj ekzistantaj sur nia terглоbo. Imagu, antaŭ kelkaj tagoj post kelkaj glasetoj da brando mi flue komunikis kun eskimo. Ni ne havis lingvajn malfacilaĵojn. Venu ankaŭ vi por trinki glaseton da brando!

Amiko, ĝi estas la vera internacia lingvo.

-Ŝaŝa-

Poezio

Ivan Naumov
Floreto

Mi kisas la vangon ŝatotan. Interne mi ridas –
Pro kvanto da "o" en novelo de nia renkonto.
Sed subas la ridon tremeto: mi jam ne sinfidas,
Ĉar kreskas la dubo: ĉu *mi* tie restas venkonto?

Ne plue mi certas, ke havas animon el brikoj,
Eternaj por tempo, tro firmaj por rompo kaj krevoj...
Jen – brikojn disportas popece hastemaj formikoj
Por kre' de moskeoj formikaj al Amo kaj Revo.

Mi ĉasis Liberon, mi ŝatis matenan malplenen
De l' ĉambro, de l' lito, de l' mondo – por nova
vespero.
Sed nun – ĉu en plena frenez'? – mi serĉadas
katenon,
Tra miaj kirasaj ridetoj penetras sincero!..

Mi ŝtone rakontas: "Floreto, mi scias petoli.
Min logas okuloj scipovaj kaj lagi kaj steli.
Karonta, mi devas konfesi: kutima pli-oli,
Mi kvazaŭ junulo – esperis kaj strebos plej-eli..."

Mi skize desegnas la mondon de navo laŭ tajdoj,
De rajdo tra kampoj, enombra amoro sub pinoj.
Kaj vi, grandokula, miranta, tuj preta al rajdoj,
Kapklinas al mi, sur la ŝultron kun kalo pro klinoj.

"Aĥ ne, ne rapidu!.. Alteme: vi konas la kanton?..
Gustumu: ĉi-jara apenaŭ similas realon."
Kaj mi, menciante trankvilon, senplaŭdon kaj
lanton,
Per mano sunbruna plenigas kvarcvitran pokalon.

Ĉu-flustre, ĉu-pense mi gajas pri via destino:
"Pretiĝu, floreto, mi havos timigan aŭdacon!"
En kvara linio mi rimos vin... Eble, kun vino –
Ĉar ĝuas la lipoj tuŝantaj la ruĝan surfacon.
15.03.92. *Vespere*



Mikaelo Bronŝtejn
Jam, kiam

Jam, kiam mi estiĝos
Tute laca, tre kaduka, –
Tiam iam okupiĝos
Nure pri labor' traduka.

Kiam haroj perdos denson,
Montros grizon surtempian,
Tiam ĉiun fremdan penson
Mi tradukos, kvazaŭ mian.

La propra opinio
Estingiĝos sinofere,
Kaj degelos mia mio
Eĉ surpapere.

Jam, kiam mi kutimos
En la plato serĉi fundon,
Volnevole ekestimos
Ŝtelon, flaton, monabundon,

Kiam nur iama gloro
Inercie antaŭkuros,
Mi en iu trista horo
Mian gorĝon, certe, ŝnuros.

Se donus tian sorton
Mia sorta vivovojo, –
Mi preferas ĝojan morton
Al la morta ĝojo.

Jam, kiam dum izolo
Mornaj pensoj min sieĝos,
Tiam iam mi en folo
La amikojn forajn preĝos.

Ja hela rememoro
Tiam tuŝos min ekstaze –
Doloreto, ne doloro,
Kvazaŭ vangon vundis raze.

Se la esto jam ne festo,
Nur la griza emocio, –
Mia fora ul' favora
Savu min de tio.



Diru al mi la veron!

(rakonteto)

Georgo vekigis frumatene. Ekstere ankoraŭ estis malhelo. La domo estis silenta, eĉ ankaŭ la hundo dolĉe dormis en la hundostalo. Alifoje ĝi ĉiam ekbojis, se oni vekigis. Nun ĝi forgesigis pri la mondo kaj pri sia tasko.

Kvazaŭ plumbo retirus lin en la liton, tiel malfacile estis la ellitiĝo. Krome en la ĉambro estis malvarmo. Ankoraŭ oni ne hejtis. Vere ĉi jare la aŭtuno estis alveninta frue. Hieraŭ ankoraŭ estis somere kaj nokte ĉio ŝanĝiĝis. Je mateno frosta vento kuradis sur la stratoj, kiel petola infano.

Li ne ŝatis tiajn matenojn. Ili estis teruraj kaj lacigaj. Tamen li devis ellitiĝi, forlasi la agrablan liton. Li devis vojaĝi al la ĉefurbo por renkontiĝi kun Maria.

Hieraŭ posttagmeze pertelefone ili priparolis la randevuon.

Malfacile li ellitiĝis. Iom la glacia akvo helpis rekonscii lin. Ankaŭ la glaseto da kafo donis al li vivforton kaj li ekiris al la stacidomo.

Malmulte da homoj estis en la vagono, tiel li povis okupi lokon laŭ sia plaĉo, nenies piedo aŭ genuo ĝenis lin. Kvazaŭ li estus kuŝante, tiel li sidis apud la fenestro kaj indiferente rigardis la malhelan pejzaĝon. Oriente jam komencis ekaperi la unuaj sunradioj de sub la nuboj. Tiu ĉi malforta lumo orumis la firmamenton.

Senrimarke li endormiĝis. La konduktoro vekis lin ridetante:

-Sinjoro, ni alvenis, bonvolu descendi!

Li tuj eksaltis kaj diris kelke da dankvortoj al la konduktoro. Li ege devis rapidi al la randevuejo, ĉar je la naŭa Maria atendos lin antaŭ la hotelo Parko.

Bonŝance la hotelo ne estis malproksime de la stacidomo. Perpiede vere iomete kurante li atingis ĝin dum kvin minutoj.

Maria jam estis tie. Ŝi ĝuste rigardis sin en la vitro de la montrofenestro.

-Salut'! – diris al ŝi Georgo kaj li alpaŝis la virinon.

Ŝi turnis sin kaj fride kisetis lian vangon. El la kiseteto mankis la varmo kaj pasio.

Georgo tuj sentis, ke la problemo estas granda. Tiu ĉi renkonto ne estos por li delica. Jam ankaŭ la mateno malbone komenciĝis. Bone, okazu kio ajn, li restos trankvila. Vere ankoraŭ li ne sciis, kio ĝenas ŝin. Pro kio ŝi ĉagrenas. Estus bone scii. Sed nun ankoraŭ li timis demandi tion. Li atendos, kio okazos, kiel rilatos al li Maria.

Sekvis longa, muta silento. El ili neniu volis ekparoli la unua. Nur iliaj okuloj babilis, kiel ili rigardis unu la alian.

Maria havis belegajn bluajn okulojn. Tiuj ĉarmis Georgon, kiam ili renkontiĝis unue. Ankaŭ

tiam li longe rigardis ilin. La okuloj de Maria povis paroli. Tiuj vortoj atingis lian koron. Ankaŭ nun li ĝene staris antaŭ la junulino kaj atendis.

Fine Maria rompis la silenton kaj iom ridetante demandis:

-Kiom longe vi volas stari tie ĉi mute?

Georgo ne sciis, kion respondi. Fine li ekkaresis la vangon de Maria kaj li diris:

-Ni iru en iun kafejon por trinki glason da nigra kafo!

La ideo plaĉis al la junulino kaj ridetante sekvis lin.

Li ne sciis, kien iri, ĉar li ne konis la ĉirkaŭaĵon. Subite Maria ekvidis en la malproksimo kafejon. Ĝi estis malgranda kaj animagorda. Ene varmo kaj agrabla kafodoro akceptis ilin.

Rapide venis la kelnero kaj portis du glasojn da kafo.

Post la kafo ili ambaŭ fartis pli bone kaj Georgo kuraĝiĝis. Tion rimarkis ankaŭ Maria kaj interesiĝante ŝi alrigardis lin.

-En la telefono vi diris, ke hodiaŭ vi deziras demandi min pri grava afero. Ĉu ne?

-Ho, jes! – diris Georgo.

-Mi aŭskultas vin kara!

-Tuj mi diros. Ĝi estas tre grava afero. Mi estas scivola je via respondo.

-Mi atendas vian demandon – ekridetis Maria kaj ŝi trinkis el la kafo.

Antaŭ ol paroli Georgo alvokis la kelneron.

-Mi petas glaseton da viskio.

-Ĉu vi ne petas por mi? – demandis cinike Maria.

-Laŭ mia scio, vi ne ŝatas la viskion.

-Prave, tion mi ne ŝatas, sed mi petas grandan glason da limonado.

-Pardonu sinjorino – diris ĝentile la kelnero – mi ne povas alporti ĝin. Elektu alian!

-Ĉu oranĝosuko?

-Per tio mi povas servi al vi – respondis la kelnero – vi petas grandan glason da oranĝosuko kaj glaseto da brando kun sodakvo.

La kelnero forrapidis kaj Georgo denove restis kune kun la knabino, kiu malpacience atendis, kion li volas diri al ŝi. Ŝi jam estis tre scivolema.

-Karulo, ĉu vi fine diros ion al mi aŭ ne?

-Kompreneble mi diros. Ne ĉagrenu!

-Vi estas tro mistera. KREDU min, efektive mi jam volas scii pro kio vi invitis min.

Georgo glutegis kaj rigardis serioze en la okulojn de Maria.

-Diru al mi la veron, ĉu vi deziras lerni Esperanton aŭ ne? Tio estus por mi ege grava. Respondu karulino!

-Apáti Kovács Béla-



Ĉu vi lernus Esperanton?

(Intervjuo)

Ni decidis ekscii ĉu la homoj lernus la zamenhofan lingvon, aŭ ne. Tial ni faris amasopinio-esploron sur la strato. Ni haltigis kelkajn homojn kaj demandis: Ĉu vi lernus Esperanton?

Unue ni demandis dudekjaran studentinon.

Demandanto: Ĉu vi lernus Esperanton?

Respondanto: *Kio estas Esperanto? Mi ankoraŭ ne aŭdis pri ĝi.*

D: Esperanto estas artefarita lingvo. Ĝi estas elternebla pli facile kaj pli rapide ol iu nacia lingvo.

R: *Ĉu ekzistas Esperantolando, kie oni parolas tiun ĉi lingvo?. Mi ŝatas vojaĝi, se mi havos multe da mono, tiam nepre vojaĝos tien, kaj mi lernos certe tiun Esperanton.*

D: Esperanto estas parolata en la tuta mondo. Ĝi apartenas al neniu lando aŭ popolo. Tiel Esperantolando ne ekzistas.

R: *Bedaŭrine. Ne, mi ne volas lerni ĝin.*

Ni atendis alian preteriranton, kiun ni haltigis kaj demandis lin. Li estis duonkalva, okulvitra maljunulo.

D: Sinjoro, mi volas demandi de vi, ĉu vi lernus Esperanton? Certe vi jam aŭdis pri ĝi. Ĉu ne?

R: *Ho, jes kompreneble. Se mi estus demandita antaŭ kvardek jaroj, certe mi respondus, ke mi lernos ĝin. Sed tiel proksime al okdek, kial lerni fremdan lingvon. Iom mi scias la germanan. Mi jam ne vojaĝus eksterlanden. Demandu tion de gejunuloj. Ili nepre devus ellerni tiun ĉi grandiozan lingvon. Junaĝe mi ĉiam volis lerni Esperanton, sed ĉiam intervenis io. Bedaŭrinde. Pardonu, mi rapidas, ĉar alvenas la buso kaj miaj piedoj ege doloras min iri hejmen. Ĝis revido!*

Li foriris kaj enbusiĝis. Ni devis serĉi alian demandoton. Baldaŭ ni trovis viron, kiu volonte respondis al ni.

R: *Junaĝe mi lernis tiun ĉi lingvon, eĉ foje mi partoprenis ie Esperanto-aranĝon. Se mi rememoras, ĝuste tiu aranĝo okazis en Bulgario kaj ĝin partoprenis pli ol kvin mil geesperantistoj*

el la tuta mondo. Ĝi estis grandioza evento. Mi neniam forgesos, ĝis mi vivos. Ni ĉiuj parolis saman lingvon kaj bonege komprenis unu la alian. Certe nun vi estas scivolema, kial mi forlasis Esperanto-Movadon. Ĉu ne?

D: Jes. Mi petas vin, bonvolu paroli ankaŭ pri ĝi!

R: *En nia familio estis granda tragedio. Mia fianĉino, kiu estis same interesganta pri Esperanto, mortis pro aŭtomobilo akcidento. Ankoraŭ nun mi esploras, se mi pensas pri tiu terura tago. Tiam por mi ĉesis la mondo ekzisti. Longajn monatojn ankaŭ mi estis vivanta mortinto. Eterne mi pensis nur pri ŝi. Ŝian pardon mi apenaŭ povis digesti. Mi jam planis mian sinmortigon, ĉar mi ne kredis, ke mi povos vivi sen ŝi.*

D: Mi kompatas vin.

R: *La kompatado ne helpis min. Mi forlasis mian laboron. Nenio interesiĝis min. Mi nur vagadis de mateno ĝis malfrua nokto sur la stratoj de la urbo kaj mi revadis pri mia admirinda fianĉino. Certe nun jam vi komprenas, ekde tio min ne interesis Esperanto. Plurfoje mi ne vizitis la lokan Esperanto-klubon. Kvankam miaj esperantistaj geamikoj ĉiam invitis min, sed mi ne volis iri tien. Baldaŭe mi translokiĝis al alia urbo kaj tiel ĉesis mia esperantista kariero.*

Sed por la nunaj gejunuloj mi proponas, ili lernu tiun ĉi utilan lingvon, ĉar per ĝi oni povas trovi sincerajn geamikojn en la tuta mondo.

D: Mi dankas vian inceran, sed malĝojan parolon. Ĝis revido!

Mi ankoraŭ haltigis multe da homoj. Grandparte ili aŭdis pri Esperanto kaj pozitive parolis pri la zamenhofa lingvo, kio estas bona kaj esperoplena. Sed bedaŭrinde mi trovis intervjuitojn (precipe gejunulojn), kiuj aŭdis nenion pri ĝi.

En la estonto nia tasko estos konvinki ilin kaj varbi el ili persistajn geesperantistojn.

-JOHANO-

Esperanto: kiu faciligas komunikadon inter homoj el malsamaj landoj. En praktika uzado dum pli ol cent jaroj, Esperanto estas montrinta sin esti vere vivanta lingvo, kapabla esprimi ĉiujn aspektojn de la homa pensado kaj sentado.



Por infanoj



La reĝidino kaj la ŝafisto

Trans la fora Fabeloceano antaŭ multaj, multaj jaroj vivis maljuna reĝo, kiu havis belegan filineton Rozeto. Tiu ĉi knabino estis tiom admirinda, ke la homoj ekmiris, kiam ili ekvidis ŝin promenante en la ĝardeno. Ŝia beleco ravis ĉiun.

Kiam Rozeto plenaĝiĝis, la maljuna reĝo decidis, ke li edziniĝos sian filinon.

En la tuta reĝlando estis anoncita tiu ĉi grava evento. Venis princoj, grafoj kaj grandsinjoroj peti ŝian maneton, sed al la reĝidino neniu plaĉis. En ĉiu edzokandidato ŝi trovis eraron. Ŝi indiferece forsendis ĉiun kaj ŝi diris al sia patro:

-Kara paĉjo, tiuj junuloj ne plaĉas al mi. Mi edziniĝos al neniu. Serĉu por mi tian edzon, kiu estos kapabla haltigi la Sunon sur la firmamento. Se vi trovos tian viron, tiam mi volonte iros kun li al la altaro.

La maljuna reĝo skrapadis sian kapon, sed li ne povis diveni de kie li trovos tian junulon.

Ankoraŭfoje li anoncis en la lando eĉ ankaŭ en la najbaraj landoj, ke la reĝidino estas edziniĝonta kaj kiu kuraĝas, tiu povas provi bonŝancon.

La kortego de la reĝa fortikaĵo denove pleniĝis kun junuloj, kiuj venis el la tuta mondo. La reĝidino starante sur la balkono diris al ili:

- Mi donas mian maneton al tiu, kiu povos haltigi la Sunon sur la firmamento

La ĉeestantoj ĉiuj ekprovis tion. Ili portis diversajn strangajn aparatojn, maŝinojn, eĉ kelkaj petis ankaŭ la helpon de la sorĉistoj, sed fine neniu povis haltigi la Sunon. Ili malgaje ekiris hejmen kaj diradis:

-La reĝidino petas de ni nerealigeblan aferon. Homo ne estas kapabla haltigi la Sunon.

Kiam vesperiĝis, la edzokandidatoj elĉerpiĝis, nur knabeto staris meze de la kortego. Li estis la ŝafisto de la maljuna reĝo.

-Kion vi deziras knabeto? – demandis de li la reĝidino.

-Mi deziras edziniĝi vin kara reĝidino. Via beleco ĉarmis min, kaj mi ne povas vivi sen vi. Mi decidis, ke vi fariĝos mia edzino, kaj ni feliĉe vivos en nia dometo en la vilaĝo.

Tion ekaŭdante la korteganoj kaj la reĝidino tuj laŭte komencis ridi.

-Ĉu vi deziras edziniĝi nian belegan reĝidino? Kiel vi povus haltigi la Sunon?

La reĝidino mansignis kaj diris al la ŝafisto:

-Bone, mi lasas vin fari provon, sed se vi fiaskos mi petos mian patron, ke li fermigu vin en karceron por ĉiam.

-Mi akceptas la kondiĉojn. Estu ĉio laŭ via plaĉo! – diris la knabeto – Sed mi petas vin, morgaŭ matene venu kun mi al la ŝafopaŝtejo kaj tie rigardu propraokule, kiel mi haltigos la Sunon.

-Tiel okazis. Apenaŭ mateniĝis, la ŝafisto kun la ŝafaro kaj la reĝidino iris al la paŝtejo. Alveninte ili iradis tien – reen kun la ŝafoj. Dume la bestoj plensatiĝis kaj ekripozis ĉe la bordo de la lago. Tiam diris la ŝafisto al la reĝidino:

-Nun ankaŭ mi matenmanĝas. La Suno jam estas alte. Mi petas vin pri io kara reĝidino, dum mi manĝos iom da lardo kun freŝa pano kaj bulbo: jen mia ŝafista bastono, levu ĝin, kaj tenu la Sunon por ke ĝi ne foriru de super nia kapo. Finonte la matenmanĝon mi haltigos ĝin.

La reĝidino eklevis la ŝafistan bastonon al la direkto de la Suno kaj atendis.

La knabo komencis manĝi trankvile. Ĉiun peceton da lardo li bone maĉis.

Post iom da tempo la reĝidino enuiĝis la tenadon de la ŝafista bastono kaj ŝi demandis:

-Kiom longe mi devos teni tiun ĉi bastonon? Jam miaj brakoj ege doloras min. La Suno staras sur la sama loko de post longaj minutoj. Estas tro varme. Estus bone, se ĝi kaŝiĝus malantaŭ nubon kiu donus al mi ombbron.

-Ho, Dio mia, reĝidino, per via helpo mi haltigos la Sunon. Mi pravis. Ĉu ne?

Rozeta devis konsenti kun la ŝafisto, ĉar tenante supren la ŝafistan bastonon ŝajnis al ŝi, ke la Suno haltis kaj ĝi ne movas.

-Vi konvinkis min kara ŝafisto – ŝi diris al li.

Ili ambaŭ ekridis kaj ĉirkaŭbrakumiĝis, ĉar intertempe ili ekamis unu la alian.

Anstataŭ la reĝa fortikaĵo la reĝidino iris al la dometo de la ŝafisto, kie ili baldaŭ geedziĝis. La maljuna reĝo vane petis ilin translokiĝi al la fortikaĵo. Al lia filineto tiom ekplaĉis la dometo, ke ŝi prefere loĝis tie kun sia edzo, ol en la brila palaco, kie tage kaj nokte centoj da lakeoj kaŝrigardis ŝian deziron. En la ŝafista domo ŝi ellernis kuiru, baki kaj kulturi la teron. Post naŭ monatoj ankaŭ la cikono alportis ilian bebon kaj ili feliĉe vivis ĝis la morto.

-Onklo Adalberto-




Gajaj bildoj




-Ĉu vi ĉiuj estas esperantistoj? Vivu la zamenhofa lingvo!




Sur la bataalkampo
-Jes panjo mia, mi survestis purajn kalsonon kaj ŝtrumpojn.




-Kie estas la via? Ĉu ĝi perdiĝis?



-Samideano, mi kore salutas en mia hejmo.



-Mi diris al ŝi, ke ŝi ne krokodilu!



-Oni diris, ke post kelkaj minutoj mi alvenos al la kongresejo.